

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2022

Jarkolekto 9 – Numero 3



ENHAVOTABELO

de julio 2022

Titolpaĝo:	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Lordo Robert Baden Powell (1857-1941)</i>	
<i>27a Universala Kongreso Romo 1935</i>	
<i>Omaĝe al Vilhelms Ostvalds (1853-1932)</i>	
<i>Dama de Elche 1923</i>	
<i>Kluba medalo de La Verda Stelo 1907</i>	
Spikumajoj & suplementoj: Esperanto en uniformo	13
Aspektoj de numismatiko: Monaj kaj monecaj ornamaĵoj (3)	14
Por spuremuloj: Vitrofibra medalo!	17
Valormarkoj & valorbiletoj: Brikoj por Zamenhof-monumento	19
Esperantaj stampolamenoj: Parizaj framasonoj 1913	21
Numismatika forumo: La monreformo de Wörgl 1932/33	23
Historiaj aspektoj: La Montevideo – rezolucio (1954)	25
Medalistoj: 30. Henryk Kunzek (1873-1928)	27
Terminaro: alfabeto listo (30)	28
El la gazetaro:	29
Retpoŝto	30
Anoncoj & eventoj	35

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts	Kontakto: bert.boon@skynet.be
Provlegado: Jozefo Horvath	Retejo: http://ena.frali.bplaced.net
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!	www.esperanto.es/biblioteko
Finredaktoro: Bert Boon	www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

“Espero estas nek sinonimo por optimismo, nek alia vorto por fido je rezulto, sed nocio pri certeco pro projekta sencoriĉo, sendepende de fino aŭ rezulto.”

Václav Havel (1936 – 2011)



Antaŭ nelonge amiko-numismato, kiu kolektas romiajn monerojn, estis invitinta min por povi fiere montri al mi novan, ĵus de li aĉetitan moneron de la romia imperiestro Hadriano (76-138). *Averse* sur ĝi videblas busto de Hadriano – dumvive malkaŝe ĝuanta sian samseksemon kaj ankaŭ famega pro la

konstruigo de impona murego en Skotlando – *reverse* bildo de sidanta Fortuno, la romia diino de la feliĉo, kiu portas abundokornon kaj stabon, permesante al kuriero neĝenetan trairon. Sur la manplato mi balance “pesis” la arĝentan artefakton, kaj min mense tuŝis la impreso, ke sur mia mano kuŝas la historio de preskaŭ du mil jaroj. Mi imagis ĝin en la manoj de multaj mortintaj kaj forgesitaj antaŭuloj. Mi eĉ fantazie pripensis la eblecon, ke iu romia belulino kun tiamaj hipermodernaj sandaloj per ĝi aĉetis veston aŭ juvelon. Tiu monero ja postvivadis en la epoko de la vikingoj kaj dum la regado kaj la pereco de Napoleono kaj eĉ dum du mondmilitoj kaj en nia vivtempo, ni aktualaj naskoonduloj de la 20a jarcento.

Antikvaj moneroj spiras kvazaŭ la saman romantikan etoson kiel konkoj de distaj marbordoj, kies loĝantoj jam delonge malaperis. Sur artefaktoj kiel la hadriana monero paradas kronitaj kapoj, noblaj nazoj kaj vortoj kiel *concordia* kaj *gloria*, kvazaŭ sloganoj de perfekta mondo. Tamen ekzistis nur kelkaj imperiestroj kun iom da meritoj; la plimulto el ili tamen estis fifamaj kanajloj kiel Kaligulo, Nerono, Komodo...

La historio daŭre alimaniere ripetiĝas, ĉar post pli ol du mil jaroj diversaj aktualaj ŝtatestroj senĝene regas kiel iamaj tiranoj kaj diktatoroj, kiuj ne sentas naŭzon pro sangoverŝado. Ĉiu (antikva) monero klare ilustras la homan historion, kiu montras, ke iam ekzistis jam aro da interesaj kulturoj, sed eĉ ne unu el ili prave meritas la nomon “civilizacio”. Jen do vorto almenaŭ provizore forstrekenda...ĉu ne?

Kulturelemento de la homa historio - ne pli, ne malpli - estas nia numismatiko, la studniĉo de ENA. Pri ĝi kaj ĝiaj rezultoj ni celas regule heroldeti.

Denove diversaj personoj kaj asocioj volontege aŭ post simpla peto kontribuis al ĉi tria numero de la naŭa jarkolekto. Ties nomojn vi trovas kiel kutime sub la artikoloj kaj en la retpoŝta rubriko. Kelkaj el ili propravole dissendadas nian revuon al dekoj da nemembraj aliuloj, kies adresojn ENA eĉ ne scias. Ilin kaj niajn novajn membrojn de 2022 (provizore jam kvar) ni tutkore dankas, ĉar ili helpas nian asocion starigi etan gvidmarkilon en la ampleksa historio de la esperanta movado.

Bert

Baden Powel kaj Esperanto

La skolta proleterca insigno “Esperanto”



“El la proletercaj insignoj, starigitaj de Baden Powell, kelkaj celas distingi nur skoltojn, kiuj sukcesis iel subteni proksimulojn. Tiuj specifaj insignoj nomiĝas “Krona Skolto”-insignoj. Meritas specialan atenton unu el ili, nome tiu de INTERPRETISTO. Por akiri ĝin (laŭ la t.n. 397a skolta regulo) la kandidatoj devas regi kaj la nacian lingvon (aŭ pli da, se estas pliaj) kaj almenaŭ unu fremdan lingvon. Ĉu akirinto de tia insigno do vere perfekte regas tiun fremdlingvon? Evidente ne! Tiu preferata lingvo, ĉu la angla, la germana, la franca aŭ alia, tute ne permesus interkompreniĝi kun iu ajn fremdlingvano. Ĝia aktivectereno logike estus limigata, se la kandidato ne regus veran internacian lingvon kiel Esperanto...”

Baden Powell, kiu agnoskis la nemalhaveblan valoron de Esperanto, deklaris en sia libro “Boy Scout test Book”, ke la insignon de interpretisto oni prefere akiru per la lernado de Esperanto.

Surhavi tiun specialan insignon rajtas nur t.n. gvidantoj kaj pioniroj, sed NUR SUPER LA DEKSTRA BRUSTPOŝETO, do ne sur la maniko kiel alispecajn! Tio klare montras la eksterordinaran valoron de tia insigno.

Bezonataj por povi akiri ĝin estas du skribaj ekzamenoj. La pli facila estas la regado de la bazo de Esperanto. La dua ekzameno, kiu estas malpli facila, povas esti farata hejme, sen uzo de lernolibro, sed eventuale per uzo de vortaro por specifa aspekto. Sufiĉas do por la dua ekzameno la parolo de honoro de la skolto!

La sube montrata brodita insigno “ESPERANTO” estas enmanigata post sukcesa ekzameno en la Esperanto-sekretariejo.” Verkis: J. Van Gulck G.C.

Tradukis Bert



Fonto: “Kompas”, 20a jarkolekto n-roj 7-8, p. 225 “Vaardigheidsinsigne Esperanto” 1949

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Lordo Robert Baden Powell (1857-1941)



Lando: Nederlando

Metalo: patinita latuno

Diametro: 30,4 mm

Jaro: 1937

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 11 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2,2 mm

Averso:

ĉirkaŭe: surskribo "LORD BADEN-POWELL"

meze: busto de B. P. en skolta uniformo, maldekstren

Reverso:

meze: antikva velŝipo

sube: en la nederlanda: "WERELD-JAMBOREE NEDERLAND 1937"
(= Mondĵamboreo en Nederlando 1937)


Rimarkol:

Jen memormedalo okaze de la 30-jara jubileo de la monda skolta movado (°1907). Samtempe okaze de la 5a Mondĵamboreo en Vogelenzang (Nederlando).

Rimarko 2:

Fragmento el la tria broŝuro de “SCOUTING FOR BOYS” (= skoltado por knaboj) verkita unue en 1908 de B.P., trovebla sur paĝo 202 de la originala versio.

Also if you want to use a secret language in your patrol you should all set to work to learn “Esperanto.” It is not difficult, and is taught in a little book costing one penny. This language is being used in all countries so that you would be able to get on with it abroad now.



“Se vi deziras uzi sekretan lingvon por via patrolo, vi nepre eklernu Esperanton. Ne estas malfacile kaj oni instruas ĝin en libreto tre malmultekosta, nur unu pencon. Ĉi tiu lingvo estas uzata en ĉiuj landoj, tiel ke vi povos uzi ĝin nun ankaŭ eksterlande.”

Rimarko3:



Post la forpaso de sia edzo, skoltestrino Olave Baden-Powell (1889-1977) skribis en 1950 en letero al dr-o Lydia De Vibis:

“Mi jam ofte opiniis, ke estus bonege, se sinjorino Roosevelt povus konvinki Usonon akcepti Esperanton en la tuta mondo kaj enkonduki ĝin en la programon de ĉiuj lernejoj kaj organizaĵoj. Estus vere plej grave por la mondo kaj ĉefe tre utile por bona interkompreniĝo inter la popoloj, kiuj estas tre dividitaj pro la lingva diverseco.”

Dum la epoko de tiu korespondado Eleonor Roosevelt (vidvino de la iama usona prezidento Franklin Roosevelt) estis la prezidantino de la homrajta komitato de UN. Tio eble kontribuis al pretigo de la vojo al la rezolucioj favoraj al Esperanto far de UNESKO en 1954 kaj 1985.

La redakcio de ENA tutkore dankas sinjoron Johano Dopere pro la havigo de informoj kaj bildoj pri ambaŭ medaloj el lia kolekto. Li estas la prezidanto de la “Skolta Muzeo” en Loveno (Belgio). Johano lernis Esperanton en la rondo de La Hirundo surbaze de la lernolibro “Ĵamborea Lingvo” de Ko Hammer.

Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

27a Universala Kongreso Romo 1935



Lando: Italio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: 7 g

Diametro: 30 x 26 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1935

Produktisto: G. Giovanola

Averso:

supre: replikaĵo de roma statuo omaĝe al Romulo kaj Remo, mamnutrataj de lupino

meze, maldekstre: kvinpinta verde emajlligita steleto

meze: S.P.Q.R.

sube: "XXVII-VNIVERSALA-KONGRESO
DE ESPERANTO EN ROMA-1935"

Reverso:

Enmedala surskribo: "G. GIOVANOLA
MILANO"



Rimarko 1 :

La nomo de la produktisto averse estas elemento de la fandita medalo.

Rimarko 2:

La lupino kaj la du frataj suĉinfanoj estas kulturelementoj de la romia mitologio pri la fondo de la urbo Romo. La fondinto estus Romulo, kiu mortigus sian fraton Remo.

Rimarko 3:

En la urbo troviĝas statuo sur kolono. La kongresa afiŝo kaj la du tipoj de glumarkoj el 1935 montras la saman bildon.



Urba monumento



Kongresa afiŝo



Oficiala glumarko



Enigma glumarko

Rimarko 4:

La rubandeto, kun duobla fikspinglo, montras la kolorojn de la urbo Romo kaj de la ŝtato Italio. Sur la unua troviĝas bronza steleto, kies funkcio kaj signifo estas serĉataj.

Rimarko 5:

S.P.Q.R.= Senatus PopulusQue Romanus (latina) = la Senato kaj la Popolo de Romo. Ĝi estis simbola, oficiala nomo de la Romia Imperio. Tiuj kvar literoj troviĝis ĉie en la tuta antikva urbo, sur domoj, ŝildoj, monumentoj kaj diversaj aliaj objektoj.

Tipo B 1 – Ne –esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Omaĝe al Vilhelms Ostvalds (1853-1932)



Lando: Latvio

Metalo: bronzo

Diametro: 75 mm

Jaro: 1986

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: Jānis Strupulis

Diko: *serĉata*

Averso: (unuflanka medalo)

ĉirkaŭskribo: • VILHELMS OSTVALDS 1853-1932 •

• NOBELA PRĒMIJAS LAUREĀTS 1909 . GADĀ • (*en la latva*)

meze: busto maldekstren

dekstre, meze: medalista signo S86 (*kun jarindiko*)

Rimarko 1:

Ostvalds (germanlingve Wilhelm Ostwald) estis tiutempe mondfama sciencisto-kemiisto. En 1909 li ricevis la Nobel-premion pri kemio (gada)

Rimarko 2:



Inspira foto por la medalo



Monumento en Riga

Rimarko 3:

Dum kelkaj jaroj li estis esperantisto kaj poste fariĝis subtenanto de Ido.

Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

Dama de Elche 1923



Lando: Hispanio
Metalo: latuno
Mezuroj: 30 x 50 mm
Jaro: 1923

Kvanto: *serĉata*
Pezo: *serĉata*
Medalisto: *serĉata*
Diko: *serĉata*

Averso:

meze: busto de la “Dama de Elche” + steleto kun ena majusklo E

sube: “I a KONGRESO DE VALENCIO MAJO 1923”

Rimarko 1:

La 1a Iberia Kongreso de Esperanto en Valencio, post du kunvenoj, respektive en 1920 (Barcelono) kaj en 1921 (Zaragozo), estas konsiderata kiel la 3a Hispana Kongreso de Esperanto!

Rimarko 2:



La kvaran de aŭgusto 1897 la bienisto D. Manuel Campello Esclapez hazarde malkovris sur private tereno de la arkeologia sito de Alkudio (Elĥe, Alikanto) la statuon de la “dama” (=sinjorino). Eble ĝi estas la supraĵo de pli granda monumento. Ĝi mezuras 56 x 45 x 36 cm kaj pezas 65,8 kg.

Ĝi estis dum 30 jaroj ekspoziciita en la Prado - Muzeo en Madrido kaj ekde 1971 ĝi apartenas al la kolekto de la “Museo Arqueológico Nacional de España”, Madrido. Laŭ arkeologoj ĝi probable datas el la epoko de la 5a-4a jarcentoj. Origine la statuo estis multkolora kaj la okuloj estis faritaj per vitreca pastaĵo aŭ per ŝtonoj. En la dorso estas truoj, eble uzeblaj por enmeti urnon.

Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

Kluba medalo de La Verda SteLO Antverpeno 1907



Lando: Belgio

Metalo: arĝentita

Jaro: 1907

Mezuroj: 27 x 30 mm

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 7,35 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2 mm

Averso:

ĉirkaŭe: surskribo "LA VERDA STELO ANTVERPENO"

ambaŭflanke: laŭrobranĉeto

supre: ambaŭflanke elstarajeto

tute supre: pendigileto apartenante al la medalo

sube: ambaŭflanke duobla liberlasaĵo kun po du kugletoj

meze: ĉirkaŭskriba slogano: "KLOPODU PERSISTU KAJ VI VENKOS"

tute meze: ankro (Antverpeno estas havenurbo), parte antaŭ la norda parto de mondglobo (tute sube) kaj parte malantaŭ blazoneto kun stelo kaj surskribo: "ESPERANTO 1907"

Reverso:

permane engravurita: “S-INO L. FAES – JANSSENS PRO MERITO”

tute sube: signo de la medalfarejestro aŭ de la medalisto

Rimarko 1:

“La Verda Stelo” estas antverpena pionira asocio el 1907, kiu ankoraŭ ekzistas.

Rimarko 2:

laŭ la koncepto de la tiama “Novarto” (Art Nouveau / Jugendstil) riĉe ornamita medaletto

Rimarko 3:

Lucette Faes - Janssens estis membro de la Flandra Ligo de 1936-1938. Ŝi havis diplomon pri profesora kapableco kaj instruis Esperanton inter la mondmilitoj. Ŝi partoprenis en la nacia kongreso de 1912 kaj en la UK de 1928.

Rimarko 4:



sur la maldekstra reverso ni ne vidas la signon kiu tamen estas videbla sube sur la dekstra.

Rimarko 5:



nur kun nomo



nomo + aldono



nomo + jarindiko


Rimarko 6:

multajn aliajn informojn vi trovas en pli ampleksa artikolo en jarkolekto 8 numero 2 p. 17.

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Esperanto en uniformo

Esperanto-kurso ĉe IPA-ĝendarmoj en Prago 1927



ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Monaj kaj monecaj ornamaĵoj (3)

F. Modernaj monaj ornamaĵoj

1. Lertaj artistoj, valoraj artefaktoj

La konata “hobonickel” naskiĝis en Usono. Ĝi estas skulptura artaĵo surbaze de malaltvaloraj moneroj. La rezulto montras miniaturan bareliefon. La vorto “hobo” estas usona slangvorto kun la signifo “vagulo”; ofte malriĉuloj kaj senhejmuloj, kiuj traiksis la landon kiel kaŝpasaĝeroj de ŝarĝvagonaroj. La termino “hobo-nickel” do signifas “vagula kvincendo”.

La plej oldaj tipoj datas el la epoko 1750-1913. Je la komenco la skulptistoj (gravuristoj) preferis la t.n. “United States Seated Liberty”-monerojn kaj la “Morgan-dolarojn”, preferatajn pro la malgranda formato, la maldiko kaj la relative moleco.

Sur ambaŭflanke aŭ nur unuflanke permaŝine glatigitaj moneroj oni sekve gravuris inicialojn, monogramojn, nomojn, scenojn ktp. Tiel centmiloj da moneroj estis permane transformitaj.



Seated Liberty-kvarondolaro



Morgan-dolaro

En 1913 aperis la t.n. “bizon-kvincendo”. Pro la entuziasmo en rondoj de vaguloj sekvis granda diverseco je gravurstiloj, instigita ankaŭ de la pli granda kapo de indiĝena amerikano, kio ebligis pli delikatajn detalojn.



Bizon-kvincendo

En la epoko 1940-1980 atentigis pri si novaj skulptistoj, tiel ke stiloj kaj temoj moderniĝis. Krome venis novaj teknikoj, kaŭze de pli fortaj gravuriloj, vibrant instrumentaro kaj feltkrajonoj por kolorigi hararojn.

La provizore lasta, do plej moderna, epoko komenciĝis en la okdekaj jaroj de la 20a jarcento. Meĵloŝtono estis artikolo de la numismato Del Romines pri “hobo nickels”. En 1982 li aperigis la unuan normverkon “Hobo Nickels”. Tiel iris en la lumon du adeptoj: John Dorusa

kaj Frank Brazzell. Sekve aperis aliaj kiel “Cinco de Arturo” kaj unu el la absolutaj majstroj: Ron Landis. Aliaj grandaj hobo-gravuristoj estis Sonny Carpenter kaj Bill Jameson. Probable 200 000 kvincendoj estis kreitaj inter 1930 kaj 1980! La sukceso de tiuj kreaĵoj kreskadas en nia 21a jarcento.

2. Roman Booteen: ĉu la Majstro de la majstroj?

Butin (Booteen), rusdevena ikono de la t.n. “manfaritaj mekanikaj moneroj” estas koncerne ideojn, personan teknikan stilon kaj lertecon granda artisto.

Roman, en la tradicio de la vaguloj, adaptas originalajn monerojn surbaze de propraj ideoj, skizoj kaj gravuraĵoj, sufiĉe ofte bazitaj sur personoj kaj eventoj el la populara subkulturo.

Pri lia privata vivo nur malmulte estas konata. Li mem diras, ke li malŝatas vendi siajn unikaĵojn, sed ke li bezonas enspezojn por vivi. La artaĵoj tamen ne estas troveblaj en aŭkcioj, sed li akceptas aŭ simple ne akceptas ofertojn de eventualaj aĉetontoj. Do, li klare preferas plejeble privatan, facilan negocon. La prezoj fluktuas inter 10 000 kaj 17 000 usonaj dolaroj por peco. Ĉiuj estas originalaj kaj Roman laŭdire ne faras mem kopiojn, eĉ ne por si mem. Li tamen akceptas, ke aliuloj kun permeso reproduktas imitaĵojn de liaj verkoj.



La plej mondsdua bareliefo ĝis hodiaŭ estas lia “Kaptilo kun ora logaĵo”. La aversa flanko estas kupolforma, sed la reverso estas vere sensaciaĵo. Tiu skulptita dolaro havas kiel kernon oran dupeso-moneron el 1945, ĉirkaŭitan de fingrokaptilo, funkciigata de risorto. La logaĵo kompreneble estas la ora monero. Se iu provas forpreni la moneron, la kaptilo batfermiĝas! Ĉirkaŭe estas gravurita sentenco en la latina de Sir Walter Scott: “AURUM MULTO MAGIS ANIMAS PERDIDIT QUAM FERUM CORPORA CECIDIT”. En esperanto traduko: “Oro mortigis pli da animoj ol fero detruis korpojn”.

Menciindaj estas ankoraŭ liaj famegaj “La ora insekto” kaj “La batanta koro”.

La “insekto”, kun unikaj moveblaj flugiletoj, estas bazita sur originala Morgan-dolaro kun 24-karata ora korpo kaj 20 g da arĝento.



Ĉi tiu monero estas bildo de ora skarabo, bazita sur rakonteto de Edgard Allan Poe sub la titolo “The Gold Bug”. Ĝi estis farita per du arĝentaj dolaroj el 1921, velditaj per ora kvindolara monero el 2015. Kiam sin malfermas la flugiletoj, oni vidas grandan L, kiu devenas de la latina cifero por 50. La ora skarabo estis ja la 50a gravuraĵo de Butin. Sub ĝi ankaŭ troviĝas latina proverbo, bedaŭrinde malfacile legebla. Ĝi signifus: “La plej kara objekto devus esti io, kio estis serĉita pli intense kaj plilonge ol iu ajn alia objekto”.



La per mekanismo batanta koro estas ankaŭ unu el la majstroverkoj de la artisto Roman Butin, sed samtempe nur “E PLURIBUS UNUM” = unu el arego de liaj artefaktoj. Ankaŭ ĉitie li aldonis latinan proverbon: “ARS NATURAE IMITATIO EST” = arto estas imitato de la naturo.

Bibliografio:

- Stephen P. Alpert. *Hobo Nickel Guidebook*. 2001, 122 pages.
- Bill Fivaz. "Reverse Carvings on Hobo Nickels". *Nickel News*, Fall 1987.
- Delma K. Romines. *Hobo Nickels*. Newberry Park, CA: Lonesome John Publishing Co., 1982, 106 pages.
- Joyce Ann Romines. *Hobo Carvings: An Exclusive Upgrade of Hobo Nickel Artistry*. 1996, 108 pages.
- Michael Wescott with Kendall Keck. *The United States Nickel Five-Cent Piece: History and Date-by-Date Analysis*. Wolfeboro, NH: Bowers & Merena, 1991.
- Original Hobo Nickel Society, numismatic community interested in carved coins, primarily 1913-1938 Buffalo nickels. Both classic carved nickels and recent carved nickels are generically called "hobo nickels".
- SSoIH Carver's Database, Hobo Nickel Carver Signature Search. Searchable database of carver signatures and examples of their work.
- Nickel Carver's ShowCase, a collection of photos showing individual carvers and examples of their carvings where available. Includes currently active carvers, known classic carvers and "nicknamed" classic carvers.
- Alpert's Artist Galleries, an expanded and updated online version of Steve Alpert's *Hobo Nickel Guidebook*.

Multan dankon unuflanke al Archeologie Online, kiu permesis al ENA montri la foton de trovaĵo sur paĝo 17 de la unua numero de jarkolekto naŭ, aliflanke al Thijs Smeets de la firmao Dawson Gold, kiu donis permeson publikigi la kvar fotojn de oraĵoj kun indikaj sagetoj sur paĝo 16 de la dua numero de jarkolekto naŭ.

POR SPUREMULOJ!

Vitrofibra medalo!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. Ĉu vi povas helpi nin?

XXIIIa enigmo



La Associação Paulista de Esperanto, kiu estus eldoninta la murmedalon pri Bona Espero, informis al ni, ke ili ne havas registrojn aŭ alian informon pri ĝi. Ili informis, ke la nura murmedalo, kiun ili eldonis, estas la ĉi montrata specimeno.

Ili ne havas multajn informojn pri ĝi. Ili mem eĉ ne havus unu ekzempleron, nur la foton. Ili nur scias, ke tiu murmedalo estas farita el **vitrofibro**.

La redakcio kore dankas nian ENA-membron Roberto da Silva Ribeiro el Brazilo pro la sendo de tre utilaj informoj kaj de la supra bildo de la medalo.

La monumento de la juna Zamenhof troviĝas en la strato Ludwik Zamenhof de lia naskiĝurbo Bjalistoko.

La projekto estis lanĉita en la jaro 2017 per konkurso por artistoj, por krei skizon de nova statuo de Zamenhof. Gajnis la konkurson Ryszard Piotrowski kaj Katarzyna Piotrowska.



Ĉirkaŭ la monument surstrate troviĝas literoj de tri alfabetoj (la latina, la hebrea kaj la cirila) de la tiam parolataj lingvoj en la urbo.

Tiu latuna statuo estis inaŭgurita de la urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski, la 14an de aprilo 2019, memore je la 102a datreveno de la forpaso de Zamenhof.

La projekto estis finance subtenita i.a. per **vendo de paperaj brikoj** (140 x 76 mm).



LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF
15.12.1859 – 14.04.1917

EN ĈI TIU STRATO KIEL JUNA KNABO
LOĜIS LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF.
LA MULTAKULTURA URBO BIALISTOKO
INSPIRIS LIN INVENTI LA UNIVERSALAN
LINGVON ESPERANTO, KIU ESTONTECE
POPULARIĜOS EN LA VASTA MONDO.

La redakcia dankas sinjorinon Danuta Mikołajewska pro la traduko de la teksto sur la ŝildo.

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Brikoj por Zamenhof-monumento en Bjalistoko



tipo 1: kun pola valorindiko

reverso de ambaŭ tipoj



tipo 2: kun dolara valorindiko

filigrano de la dua tipo





ESPERANTAJ STAMPOLAMENOJ

Stampolameno de la parizaj framasonoj 1913

Framasona medalo 1913 – 2013



== Societaro. ==

Al la anoj de „Esperanto Framasona“.

Ĉar nia lasta kunveno okazis jam dum la 7a Internacia Esperanto-Kongreso en Antwerpen, kaj ĉar ni ne povis kunveni en Kraków en tiu ĉi jaro, aliflanke jam nun belaj oficialaj kunvenoj estas preparotaj por Genova 1913 kaj Paris 1914, mi, kiel unu el la fondintoj de nia ligo, rekomendas al niaj karaj membroj, rekomenci vigran agadon por nia ligo.

Mi ankaŭ rekomendas al ili abonon je la internacia Esperanta gazeto „*Homaro*“, aperanta en Madrid (Hispanujo), 8 Pasaje del Comercio, eldonata kaj presata de FFrr., kaj reprezentanta niajn interesojn. Krom tio, enskribo kiel esperantista framasono en „*La Internacia Framasona Jarlibro*“, aperanta en Neuchâtel (Svisujo), 26 Rue des Beaux Arts, estu rekomendita al niaj FFrr.:

Estas necese, ke Esperanto fariĝu baldaŭ oficiala lingvo, uzota en niaj estontaj internaciaj framasonaj kongresoj. Tio estas ebla, se ni aranĝos paroladojn en ĉiuj framasonoj, sekvotaj de kursoj en nia lingvo, speciale aranĝitaj por niaj FFrr., kaj se ni varbos novajn anojn al nia asocio.

Laŭ la statutoj de „*Esperanto Framasona*“ ĉiu ano devas pagi ĉiujaran kotizajon de 1 Sm. aŭ 2.046 Markoj. Mi estus tre danka, se la anoj havus la afablecon, sendi al mi per poŝtmandato aŭ per la ĉie haveblaj respondkuponoj tiun malgrandan sumon kiel kotizajon por la jaro 1912/1913. Tuj post la pago la FFrr. ricevos kvitancon.


Mi petas vin, KKrr. FF., akcepti jam antaŭe mian sinceran dankon pro tio, kaj mi sendas al vi miajn plej korajn fratan kaj samideanan salutojn.

Via frate sindona

C. Barthel,

Sekretario-Kasisto Esperanto-Framasona
Frankfurt (Main), Woehlerstr. 14.

Ĉi tiun medalon, konsiderinde samaspekta kiel la stampo, ni jam priskribis kaj komentis en jk.1 n-ro 4 p.13.



Al Ĉiuj!

№2703*

Inerta moncirkulado mergis la mondon en severan ekonomian krizon kaj milionojn da laboristoj en teruran mizeron. – La malprogreso del' mondo (koncerne la ekonomon) komenciĝis. – Urĝe necesas agnoski tion, kaj per decida agado bremsi la suben impetantan ekonomian maŝinon, por ke la homaro ne estu pelata al interfrata malkonkordo, ĥaoso kaj morto.

La homoj prosperas per la interŝanĝado de siaj **Laborproduktoj**. La kripla moncirkulado grandparte subfosas tiun interŝanĝon kaj milionoj da laboremuloj jam perdis sian laborlokon en la ekonomia mekanismo. La interŝanĝo de laborproduktoj devas esti ree plivigligita kaj la vivtenado de marginiĝintoj regajnta. Tiu cele al ili estas disponigataj monvalora testiloj de la foirvilaĝo Wörgl.

Tio kompensas la Bezonon, redonas Laborproponon kaj Panon!

Vortoj de Michael Unterguggenberger, vilaĝestro de Wörgl, kiu en 1932 rifuzis submetiĝi al la komandoj de la internacia financa magnataro kaj al la de ili kaŭzita krizo.

La monreformo de Wörgl 1932/33

„Dum en la tuta mondo la ekonomia vivo lamiĝis per la internacia monstriko, tiu urbestro eltiras sian mizeriĝintan komunumon el la apatio per la monreformo de Wörgl laŭ la ideo koncerne liberan monon de Silvio Gesell” – tiel kaj simile eŭforie la internacia gazetaro raportis en la 30aj jaroj pri la kiel libera mono de Wörgl ankoraŭ mondscale konata moneksperimento.

Kio estas la esenco de tiu monreformo, per kiu la urbestro Michael Unterguggenberger volis „doni signalon al la mondo”? Kial tiu agado en Wörgl kontraŭ la mizero ankoraŭ hodiaŭ aperas kiel instrua ekzemplo en universitatoj de la tuta mondo? Kio okazis tiam en la “malgranda Tirola foirvilaĝo”?

La monda ekonomia krizo, kaŭzita en 1929 per la borsa kolapso en Usono, trafis komence de la 1930aj jaroj ankaŭ Eŭropon kaj kun ĝi la Aŭstrian ekonomion. Kaj speciale severe ĝi trafis Wörgl. Per la konstruo de la fervojo dum la 19a jarcento tiu komunumo, ricevinta en 1911 la titolon de foirloko, evoluis de kamparana vilaĝo al regiona ekonomia centro kun industrio kaj me-
 tiaro.

lojn – de kiuj 200 ne plu ricevis ŝtatan subvenciojn kaj devis esti prizorgataj de la komunumo. Sed la komunuma kaso malplenis, repageblis eĉ ne la interezoj por la kredito de 1,3 milionoj da ŝilingoj por la konstruo de la mezgranda lernejo.



Michael Unterguggenberger.

Kiel do elveni el tiu mizero? Dum tutaj familioj elmigris el Wildschönau al Brazilo, volis tie krei sian estontecon kaj fondis Dreizehnlinden, dum tri junuloj furiozis en Hopfgarten ekbruligante incendion kaj murdante por akiri monon, la urbestro de Wörgl trovis kreivan eliron: Ekzistis sufiĉa laboro – nur mankis la mono por pagi ĝin. Do la Wörgl-anoj mem presis sian monon.

kontraŭaj ideologioj – la komunuma konsilantaro faris ĉiujn decidojn unu-anime.

Wörgl cirkuligas la monon

Por efektiviĝi la agado kontraŭ la mizero la komisiono por sociala prizorgo eldonis monvaloratestilojn en la valoro de unu, kvin kaj dek ŝilingoj. Laŭ la ideo de la malgrandiĝanta mono de Silvio Gesell la monata senvalorigo je unu procento sekurigis la cirkuladon. Per gluado de kvitanĉmarkoj la papero gardis sian plenan valoron. La unuprocenta imposto eniris la fonduson por la malriĉuloj. Kiel garantio la komisiono por sociala prizorgo deponis la valoron de la eldonitaj laborvalorpaperoj en ŝilingoj ĉe la loka Raiffeisenkaso, forte ligita al realigo de la agado. Ŝanĝkoto de du procentoj malhelpis, ke oni tuj reŝanĝis la laborvalorpaperojn en ŝilingojn.

La enplanita monimposto montras efikon

En julio 1932 la komunumo komencis realigi konstruprogramojn. La laboristoj estis pagataj per laborvalorpaperoj, faris aĉetojn en magazenoj de Wörgl, kiuj sianflanke liveris siajn impostojn – plej ofte eĉ kun konsiderindaj ŝuldpagoj – al la komunuma kaso, kaj jam denove disponeblis mono por nova konstruado. Ĉiu evitis esti devigata pagi la malpliigon kaj rapide pluendonis la paperojn.



Monvalorpapero de Wörgl.

Dum tiuj kontraŭmizeraj laboroj oni investis en 1932 proksimume 102 000 ŝilingojn en infrastrukturon kiel asfaltadon de stratoj kaj konstruadon de kanaloj au de skisaltejoj, printempe en 1933 denove proksimume 80 000 ŝilingojn por la konstruo de ponto super la rivero

An Alle! № 2703 ✽

Langsam sinkendes Geld hat die Welt zu einer unerhörten Wirtschaftskrise und Millionen schaffender Menschen in unglückliche Not getrieben. — Der Untergang der Welt hat ihre wirtschaftlich gesunde Seiten fast völlig Anfang genommen. — Es ist Zeit, durch klaren Gedanken und entschlossenen Handeln die übertriebene Wirtschaftszahl zu setzen, damit die Menschheit nicht in Bruderhölle, Wüstenei und Auflösung getrieben werde.

Leistungen. Die gesamte Größenwelt hat den Leistungsaustausch zum großen Teil unterbrochen und Millionen arbeitensüchtiger Menschen haben dadurch bereits ihren Lebensraum in Wirtschaftsetzeln verloren. — Der Leistungsaustausch soll daher wieder gelassen und der Lebensraum für alle bereits Ausgeschlossenen wieder zurückgewonnen werden. Diesen Ziele dient der Arbeitsleistungsgeld der Marktgemeinde Wörgl!

Es lautet die Not, gibt Arbeit und Brot!

La ekonomia malprospero kaŭzis, ke ĉiam malpli da mono cirkulis. La vendomerkatoj kolapsis, sekvis ĉesigo de la produktado kaj senlaboreco. La celulozfabriko fermiĝis, la cementindustrio reduktis la produktadon, kaj kaŭze de la elektriĝo de la fervojo ankaŭ tie multaj laboristoj maldungiĝis.

En 1932 en tiu regiono 1500 homoj estis senlaboraj, la foirloko Wörgl kun siaj 4 200 loĝantoj havis 400 senlaboru-

Politika majstrajo

En tiu senespera situacio Michael Unterguggenberger kaj lia libermerkata grupo de Wörgl konceptis programon por la agado kontraŭ la mizero en Wörgl, por kies realigo estis instalata superpartia komisiono por sociala prizorgo. Tie kunlaboris per la paroĥestro Matthias Riedelsperger ankaŭ reprezentanto de la katolika eklezio. La aktuala mizero kunigis la homojn malgraŭ

de Wörgl kaj la kreado de migradvojoj kaj turisma infrastrukturo.

La konstruoprogramo entenis inter aliaj alkonstruon al la komunuma muelejo kaj multajn stratiparojn en Wörgl.

Oni ankaŭ investis en turisman infrastrukturon: Printempe de februaro 1933 la skisaltejo estis inaŭgurata. Dum la libermona konstruoprogramo oni faris ankaŭ 1,2 kilometrojn longan piedvojeton en la romantikan Aubach-ravinon kiel someran turisman atrakcion. La najbara komunumo Kirchbichl komencis en 1933 per la libera mono de Wörgl la konstruon de marĉa strandbanejo.

Dum la 13,5 provmonatoj de la moneksperimento proksimume 100 homoj estis okupataj, parte rekte per la konstruoprogramoj, parte en subkontraktaj entreprenoj. La nombro de la senlaboruloj malaltiĝis en Wörgl je 16 procentoj, dum ĝi kreskis en Aŭstrio je 19 procentoj.

Averaĝe 5490 ŝilingoj cirkulis en formo de laborvalorpaperoj. Do estis po loĝanto nur 1,3 ŝilingoj en libera mono. La Nacia Banko samtempe elspezis 158,76 ŝilingojn pokape. Ĉiu



urbestro Michael Unterguggenberger (la dua de maldekstre) kun la kuratoroj de la agado kontraŭ la mizero D-ro Georg Stawa (maldekstre), paroĥestro Matthias Riedelsperger (dekstre) kaj la komunuma sekretario Rudolf Winkler.

oficiala ŝilingo peris en la provtempo vendon de varoj en la valoro de 8,55 ŝilingoj. Kontraŭe unu ŝilingo de libera mono ebligis jare ĝis 73 ŝilingoj de socia produktaĵo; tion kalkulis Thomas Wendel en sia diplomlaboraĵo.

Fritz Schwarz, tiutempa atestanto de la moneksperimento de Wörgl, faris en sia en 1951 aperinta libro „Das Experiment von Wörgl“ la kalkulon, ke la averaĝe 5490 cirkulantaj ŝilingoj de libera mono cirkulis en la 13,5 monatoj 464 foje (416 foje po jaro) kaj tiel konstatitis entute uzon de 2547360 ŝilingoj.

Schwarz alkalkulis per tio la moviĝon de la paperoj surloke – do de la komunumo al la laboristo, al la butikisto, al la metiisto, al la pogrando, al la komunuma kaso ktp. – do la lokinternan cirkuladon de la paperoj aldone al la reiro en la komunuman kason.



Pagtago: La salajroj de la laboristoj estis pagataj per laborvalorpaperoj.

D-ro Silvio Unterguggenberger, filo de la urbestro Michael Unterguggenberger enkondukinta la liberan monon, kalkulis en sia kontribuo al la hejmmregiona libro pri Wörgl (aperinta en 1998) surbaze de la nombroj de 416 transiroj de mano al mano jare kaj averaĝe 5490 ŝilingoj en 13,5 monatoj entute uzon de 2547360 ŝilingoj dum 1932/33, kio egalvalorintus en 1998 al aĉetpovo de 63684000 ŝilingoj. Konvertite en eŭroj tio egalus hodiaŭ al aĉetpovo de proksimume 5 milionoj da eŭroj.



Konstruita per libera mono: la Müllertal-ponto (= ponto super la muelista valo).

La sukcesrecepto de la monreformo de Wörgl do estis la rapida cirkulado de la regione valida kuponvaluto.

Naciekonomiistoj, politikistoj kaj artistoj interesiĝis pri la libera mono de Wörgl. En 1934 venis la franca

ekscĉefministro Edouard Daladier, en 1935 la amerika poeto Ezra Pound. Gazetaraj raportoj respegulis la mondiskalan eĥon. En Ameriko Prof. Irving Fisher volis batali kontraŭ la ekonomia krizo en 1933 per *Stamp scrip* laŭ la ekzemplo de Wörgl. La 10an de

marto 1933 oni parolis en la Uson-amerika senato pri la libera mono de Wörgl. La eŭrope skale aktiva movado por libera ekonomio observis la okazaĵojn en Wörgl same kiel la Aŭstria Nacia Banko kiu ekde la komenco vidis en ili danĝeron por sia moneldonmonopolo. Ĉar en 1933 pli kaj pli da Aŭstriaĵ komunumoj sekvis la ekzemplon de Wörgl – en januaro 1933 Kirchbichl komencis la konstruon de strandbanejo per la malgrandiganta mono de Wörgl – kaj volis batali kontraŭ la ekonomia krizo per la eldonado de libera mono, la Nacia Banko malpermesigis en 1933 la moneksperimenton per interveno ĉe la aŭtoritatoj. La protesto de Wörgl ĉe la juĝejoj restis vana.

La redakcio de *Esperanto aktuel* dankas al la Unterguggenberger Institut (Unterguggenberger Straße 3, A-6300 Wörgl, www.unterguggenberger.org, retadreso ui@snw.at, telefono +43/650/8311183), kiu prizorgas la heredaĵojn de tiu parto de la urba historio de Wörgl kaj permesis la publikigon de la artikolo kaj de la fotoj.

Ni aparte dankas al la estrino de la Unterguggenberger Institut kaj organizantino de la *Wörgler Freigeldjahr 2007*, Veronika Spielbichler, pro la alsendo de la fotoj el la arkivo, kaj al AEF-estrarano Mag. Helga Farukuoye, kiu tradukis la tekston.


HISTORIAJ ASPEKTOJ

La Montevideo-rezolucio favore al Esperanto (1954)



UNESCO (United Nations Educational Scientific and Cultural Organization = Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj por pacsocia eduko, alpaŝo de malriĉeco, stabile evoluado kaj interkultura dialogo per eduko, scienco, kulturo kaj KOMUNIKADO (majuskloj de la aŭtoro).

Surbaze de enketo kun rikolto de 19 milionoj da subskriboj, la Rezolucio IV.1.4.422-4224, alinomata la Montevideo-rezolucio, estis aprobita en la ĉefurbo de Urugvajo la 10an de decembro 1954 de la Ĝenerala Konferenco de UNESCO. La rezolucio oficiale agnoskis la artefaritan lingvon Esperanto kiel internacian helpolingvon kaj rekomendis al la ĝenerala direktoro de UNESCO observe kaj sekvi la evoluon pri la uzo de la lingvo. Krome konstati la progresojn en la kampoj de scienco kaj kulturo kaj tiucele kunlabori kun la Universala Esperanto Asocio koncerne komunajn projektojn de ambaŭ asocioj. Tiu rezolucio estis la rezulto de persista kampanjo de **Ivo Lapenna**.



En 1959 UNESCO honoris Zamenhof kiel eminentan personon rilate al edukado, scienco kaj kulturo. En 1977 la ĝenerala direktoro vizitis la Universalan Kongreson en Rejkjaviko, Islando.

En 1985 UNESCO aprobis alian rezolucion por rekomendi al la membroŝtatoj propagi la instruon de Esperanto, por provi tiel solvi la internacian problemon pri interkompreno.



Raporto en la hispana pri la rezolucio

Afiŝo de la 1a Universala Esperanto-Ekspozicio

La 7an de januaro 2020 en la Ĉina Internacia Eldona Grupo okazis la subskriba ceremonio de interkonsento pri kuneldono de la Esperanta varianto de *La Unesko-Kuriero*.

Organizita de Ĉina Raporta Gazetaro kaj Ĉina Esperanto-Asocio, la ceremonio markas la partnerecon inter Unesko kaj Ĉina Raporta Gazetaro sub CIPG por traduki kaj publikigi la Esperantan version de *La Unesko-Kuriero*, ĉefa revuo de Unesko.

La revuo estas publikigata kiel platformo de komunikado inter malsamaj civilizoj. Ĝi rekomencis la publikigon en 2017 kun subteno de la ĉina registaro kaj nun ĝi estas eldonata en 11 lingvoj.

Laŭ Du Zhanyuan, prezidanto de CIPG, “La kunlaboro inter CIPG kaj Unesko estas bona komenco. Estonte, la komunikado sur ĉi tiu platformo ebligas al ambaŭ flankoj kunlabori en pli da areoj.”

“La publikigo de la Esperanta versio de *La Unesko-Kuriero* konformas al la misio de Unesko antaŭenigi la kulturen diversecon kaj la uzadon de Esperanto”, diris Ian Denison, estro pri Eldonado kaj Markado de Unesko.

Fonto:

CHINADAILY 中国日报网
Tutmonda Eldono AZIO 中文双语 Fr

Esperantigita el la franca de Bert

MEDALISTOJ

30. Henryk Kunzek (1873-1928)



Kunzek estis pola pentristo kaj skulptisto. Li studis medicinon ĉe la Jagelona Universitato kaj finstudinte tie, li laboris kiel kuracisto en Lemberg.

Lia ĝisosta pasio tamen estis arto. Ekde 1900 li lernis pentri en la privata lernejo de Stanislavo Batovski-Kaĉor. Ekde 1903 li ekilustris la revuon “Abdera”, satiran revuon eldonatan de polaj politikistoj socialdemokrataj el Galicio kaj Silezio.



En 1905 li iris Parizon, por malkovri la sekretojn de skulptaĵoj en la kolarosa Akademio. En la sama jaro li ekstudis en la Akademio de Plastikaj Artoj ĉe Konstantino Laŝka en Krakovo. Ek de 1911 li tie instruis desegnadon en vespera kurso.

Henryk kunlaboris ankaŭ kun Johano Ŝepkovski kaj Ludoviko Puget, preparantaj teatrajn pupojn por la Kabareto Zielony Balonik. Ekde novembro 1912 (**la jaro de lia UK-medalo!**) li estis kunestro de la Pola Militista Trezorejo kaj poste li iĝis eĉ ĉefkasisto. Baldaŭ li krome iĝis kuracisto de la 3a pordefenda bataliono kaj laboris en diversaj militistaj malsanulejoj. En 1917 li leŭtentiĝis. Sekve li estis internigita de la aŭstria armeo. En 1918 li transloĝiĝis al Varsovio. Tiutempe li estis docento pri arta anatomio en la Instituto de Plastikaj Artoj. En 1919 li returniĝis al Krakovo kaj ekde 1921 li prelegis en vesperkursoj pri desegnado en la sama Akademio. Regule li vizitis ankaŭ Zarcezon kaj tie li pentradis subĉiele ĝis sia forpaso en 1928.



Kunzek famiĝis pro siaj modernismaj skulptaĵoj, bustoj kaj religiaj figuroj. Kiel medalisto li kreis medalonojn kaj belegan, esperantan medaleton en novarta stilo (ĉi-maldekstre). Krome li ilustris librojn kaj revuojn, ĉefe satirajn kaj karikatურajn. Li kreis ankaŭ literaturajn verkojn kaj verkis kolumnojn pri arto.

TERMINARO

Alfabeto listo (30)

brunigi: *tekniko de polurado de metaloj (ĉefe arĝentaj kaj oraj), por ke estiĝu altbrilo de la surfaco per bruniga ŝtalaĵo fare de ege glata kaj rondigita finaĵo.*

filigrano: *bildo nur videbla pere de penetra lumo. Metita dum la paperfabrikado kiel komerca filigrano aŭ kiel sekurigilo kontraŭ falsado (sekuriga filigrano). Tiuj filigranoj anstataŭas iamajn sekajn stampojn.*

intrinseka valoro: *(aŭ ena valoro) estas metalvaloro de monero laŭ la tagprezo de la metalo. Monero, kies menciata valoro sur pagilo estas (multe) pli alta ol la esenca valoro, estas t.n. fidata valoro. Por povi daŭrigi la ĉirkuladon la ena valoro devas resti malpli alta ol la fidata valoro, se ne oni riskas malpermesitan refandadon.*

kunifero: *alojo el kupro, nikelo kaj fero. Tre utila kontraŭ korodo, eĉ post veldado. Uzata ĉefe en mara ĉirkaŭaĵo, do ekzemple en ŝipoj.*

manstampado: *antikva tekniko, unue praktikita en Lidio (Malgranda Azio). En bovloforman kavaĵon estis unue fanditaj disketoj sferformaj; sekve ili estis en alta temperaturo metitaj sur amboson kun gravurita bildo. Fine sur ĝin estis metita bronza stango, sur kiu la monero estis plurfoje stampita per martelego.*

potino: *ŝanĝebla kunmetita alojo, konsistanta el kupro, zinko, stano, plumbo kaj arĝento, uzita en la antikva tempo por stampi monerojn kun malalta titro.*

privata papermono: *termino por ĉiuj specoj de kuponoj kun valorindiko, kiuj tamen ne estas kreditkupono kaj ne legitimaj pagiloj. Ili ĝenerale estas emisiataj de personoj, institucioj aŭ instancoj pro manko de (malaltvaloraj) laŭ leĝaj moneroj.*

provfando: *provo por kontroli fandmedalon per uzo de etvalora alojo kiel zamako.*

provostampo: *provo por stampmedalo per etvalora alojo kiel zamako.*

sekreta punkto: *punkto metita ekz. en Parizo (1389-1540) sub la 18a litero de ĉirkaŭaj surskriboj de ambaŭ flankoj, por distingi stampitajn monerojn el diversaj stampejoj.*

specimeno: *por fakcele informi kolegojn, centraj bankoj anticipe sendis ekzempleron de novaj bankbiletoj, senvalidigitan per surskribo aŭ diagonala kruco. Nuntempe specimenoj estas biletoj sennumeraj, stampitaj, surprisitaj aŭ tratruitaj per la vorto SPECIMEN.*

variado: *intenca devio de la ŝablono, kiu havas monan funkcion kaj montras intencan ŝanĝon rilate al jarindikoj, portretoj, litertipoj ktp.*

variante: *en la antaŭmaŝina epoko la stampofaristoj foje hazarde deviiis de la preskribita ŝablono. Tiuj devioj estas nomataj “variante”. Nuntempe maŝinfaritaj devioj nomiĝas “misstampoj”.*



Seviastlav Mykolajovych Fedorov (1927-2000) (Fig. 110-113) was born in Pruskarov (now Khenchirytaky), Ukraine, spent his childhood years in Kamianets-Podilskyi, graduated from the Medical Institute of Rostov, and, while working at the Charvash Branch of the Helmholtz Institute of Eye Diseases in Cheboksary, became the first to perform intraocular lens implantation in the USSR. He became head of the Research laboratory of experimental and clinical eye surgery in 1974 and the Moscow Research Institute for Eye Microsurgery in 1980, and founded the Eye Microsurgery Complex, an inter-branch scientific and technical establishment (Figs. 7-9) in 1986.

There were famous foreign ophthalmologists who, at some point of their live, were associated with Ukraine.

Thus, born in Minsk, Ivan Ustynovych Zalomych (1864-1915) (Figs. 114-115), a Belarusian philanthropist and public figure, after graduating from the medical school at the St Volodymyr University of Kyiv, had advanced training in ophthalmology in Kyiv. He was appointed as a physician to the village of Leshnytsa, Borystiv district, in 1890, and worked as a chief physician at the Minsk Provincial Zemstvo Hospital since 1904.

The Polish physician Jan (Johann) Mikulicz-Radecki (1850-1905) (Fig. 116-117) was born at the Ukrainian town of Chernivtsi. He received his education at the medical school at the University of Vienna and simultaneously at the conservatory of Vienna with a speciality in piano, was a director of surgery at the Jagiellonian University of Krakow, the University of Königsberg (1887-1890), and the University of Breslau (1890-1905) and an inventor of ocular surgical instruments, and described bilateral swelling of salivary and lacrimal glands, called Mikulicz's syndrome.

Dr Ludwik (Lejzer) Zamenhof (1859-1917) (Figs. 118-127), the creator of the artificial language of Esperanto, was born in Białystok, graduated from the medical school at the University of Warsaw, received advanced training in ophthalmology in Vienna, and practiced ophthalmology in the Ukrainian town of Kherson from 1889 to 1990.

In conclusion, it is noteworthy that the main objective of historians of medicine is to commemorate outstanding medical personalities. History of ophthalmology is an essential part of studying ophthalmology. As was noted by R.L. Stevenson (1850-1894), the Scottish writer, "the memories are a fairy gift which cannot be worn out in using", and, in the words of Oscar Wilde (1854-1900), the English writer, "the only duty we have to history is to rewrite it". Unfortunately, up to date, eminent oculists of the past have been not sufficiently commemorated by issues of numismatic pieces. Hence, it is our hope that in the future, a systematic approach to this matter as well as the purposeful promotion of the achievements of national ophthalmology by numismatics will be used, to provide a clear example for studying the history of ophthalmology and enhance the educational attainment of doctors. We look forward to the appearance of new interesting materials of such small forms of fine art.

References

1. Sarkisov AS, Sarkisov SA. [The origins of Moscow ophthalmological society]. *Vestn Oftalmol.* 2018;134(6):129-132. doi: 10.17116/oftalm201813406129. Russian.
2. Laitin K, Kasimov M, Chirizimov A, Nikolopoulos T, Muschus MM, Andronatos G. Views on ocular cancer in Arabo-Islamic medicine and the leading influence of the ancient Greek medicine. *J BUON.* Jan-Feb 2016;21(1):276-8.

“D-ro Ludwik (Lejzer) Zamenhof (1859-1917) {vidu la portretojn 118 ĝis 127}, la kreinto de la artefarita lingvo Esperanto, naskiĝis en Bjalistoko, doktoriĝis en la medicina instituto de la varsovia universitato, perfektigis en la oftalmologia sekcio en Vieno kaj praktikis de 1889 ĝis 1990 en la ukraina urbo Ĥerson.

Konklude estas menciinde, ke la ĉefa celo de primedicinaj historiistoj estas rememorigi elstarajn medicinistajn eminentulojn. La historio de la oftalmologio estas esenca aspekto de la oftalmologia studo. Pro tio jen kvoto de la skota verkisto R. L. Stevenson (1850-1894) “... la memoroj estas sinceraj donacoj, kiuj ne povas esti malvalorigataj”, kaj, kiel diris Oscar Wilde (1854-1900), la angla verkisto:

“... la nuran devon, kiun ni havas rilate al la historio, estas reverki ĝin”. Bedaŭrinde, ĝis nun, eminentaj okulistoj de la pasinteco ne sufiĉe estis honorigitaj per la eldono de numismatikaĵoj.

Ekde nun, ni esperas, ke estontece, sistema alpaŝo tiurilate, krome celkonscia promocio de sukcesplenaj rezultoj de la nacia oftalmologio pere de numismatikaĵoj estos praktikata por disponigi efikan strategion koncerne la studon de la oftalmologia historio kaj stimuli la edukajn talentojn de kuracistoj.

Tial ni avide atentis la eldonon de novaj, interesaj ekzemploj de tiaj etaj kaj delikataj artefaktoj.”

Elangligis Bert

REPOŝTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

06.04.2022 14:52

Kara Jozefo,

la vetero estas tiel malbona, ke mi decidis finverki la duan numeron de 2022. Espereble vi havos baldaŭ iom da tempo por provlegi ĝin. Mi jam tutkore dankas vin.

Amike kaj numismate

Bert

10.04.2022 10:13

Kara Bert,

jen la aktuala numero de la ENA-revuo kun miaj sugestoj. Inter la peripetioj de la kovimo kaj la ukraina milito proksima al la hungara landlimo mi esperas pli "mojosajn" novaĵojn. Nia revuo estas io tia. Dankon kaj gratulon!

Amike: Jozefo



05.04.2022 20:38

Estimata samideanino Perla Mielo,

Kiel membro de la diskutgrupo de la Medicinistoj mi ricevis de Ludoviko Molnar vian anoncon okaze de la 120-jariĝo de HEA. Bonvolu akcepti miajn gratulojn kaj tiujn de nia fakgrupo! Kun granda intereso mi ankaŭ tralegis la mirindan historion de HEA .

*Mi estus tre kontenta se vi povus pozitive respondi je mia demando ĉu tiukaze estis aŭ estos eldonita **memormedalo**. ENA preparas la eldonon de la unua Katalogo de la Esperanto-Numismatiko kaj ni intencas rezervi specialan lokon por tia nemalhavebla numismata medalo.*

Se HEA pasintecce eldonis aliajn medalojn, ni ŝatus ricevi fotojn kaj aliajn (teknikajn) informojn por kompletigi la katalogon.

Mi tutkore antaŭdankas vin!

Altestime kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko



24.04.2022 9:28

Kara Bert,

mi ricevis vian gazeton virtuale de la Herzberganoj. Mi printas ĝin kaj metas ĝin al la kolekto de EO-gazetoj en la libroservo dum Germana Kongreso.

kore

Andreas Diemel

24.04.2022 17:09

Kara Andreas,

Mi ĝojas ke la amikoj el Herzberg transsendis la revuon al vi kaj mi kore dankas vin, ke vi metis ĝin en la kolekto de la libroservo. Eblas ricevi ĝin direkte en la estonteco kaj eĉ trovi ĉiujn aperintajn numerojn. Mi nur bezonus vian konsenton por senkoste membriĝi vin mem aŭ iun ajn germanan asocion ekde nun. Aktuale ni havas 152 individuajn kaj 25 asociajn membrojn en 45 landoj.

Amike kaj numismate,

Bert

08.05.2022 23:07

Kara Bert,

mi volonte akceptas membriĝi.

kore

Andreas

* www.esperanto.de

* Europa-Union Düsseldorf

* jef-nrw.de

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.04.2022 20:00

Elkoraĵo dankon pro sendo de via belega legindaĵo, estimata fratamiko Bert Boon! Aparte estas interesa kaj ĝojiga la informoj rilatantaj al niaj samlandanoj:

1- Neesperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto Medalo honore al José Américo de Almeida (1887-1980)

2- la Plaketoj kaj medalonoj Fazenda Escola Bona Espero Brazilo.

Kun la plej bondezirhava koro, ĝis la reskribo nova, ĝis letero.

Samlingvane, ekumene, fratece,

Maria Aparecida

25.04.2022 9:48

Kara Maria!

Tutkoraĵo dankon pro via aprecio de nia revuo kaj pro la sendo de la filmeto!

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.04.2022 9:14

Dankon pro la nova numero de ENA-revuo.

Mi dissendos ĝin al la legantoj de Esperanto Libraro.

Amike

Maria Niemyjska

25.04.2022 9:43

Ne dankinde, kara Maria! Mi danku vin pro via iniciativo transsendi la revuon al la legantoj de Esperanto Libraro. Kiom da personoj ricevos ĝin tiel?

Amike kaj numismate,

Bert

25.04.2022 9:49

Ĉirkaŭ 80 personoj

:)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

29.04.2022 15:43

Estimata kara samideano Bert Boon,
granda surprizo kaj granda ĝojo estas por ni legi viajn paĝojn 7 kaj 8 de la lasta eldono de NUMISMATIKO! Vi donis tro da graveco al nia simbolo, sed ni elkore vin dankas pro tia publikigo.

En la venontaj semajnoj ni klopodos realigi la koncernan intervjuon en TVSUPREN kaj oportune vin informos.

Vi enmetis foton de mia edzo kaj mi - troigo, amiko! Tamen dankon sinceran.

Esperante ke la milito en Ukrainio ne atingos la minacatan nuklean finon, ĉar en julio Bona Espero festos 65 jarojn da seninterrompa socia asisto, kie partoprenos internaciaj volontuloj, ekslernantoj kaj apogantoj.

Amike kaj danke vin salutas,

Ursula Grattapaglia



30.04.2022 12:38

Saluton, Ivo!

Mi esperas, ke vi kaj la viaj fartas bone!

Ĉu vi eble havas pliajn informojn pri la suba medalo kaj personoj kiuj ĝin ricevis?

Multan antaŭdankon!

Amike,

Bert



02.05.2022 12:28

Saluton Bert,

La Verda Stelo havis la kutimon por honorigi siajn membrojn per medaloj: ekzistis oraj kaj arĝentaj medaloj pro specialaj meritoj. La liston de la ricevintoj vi povas trovi en la memorlibro "Esperanto en Antverpeno 1907-2007" (p 78). Siatempe oni ankaŭ donis bronзан medalon pro fidela membreco. Mi mem iam ricevis tian medalon. Mi pensas ke temas pri fidela membreco de 10 jaroj. Poste, post pliaj kvin jaroj, oni aldonis iun etan distingilon, kiun oni povis aldone fiksi ĉe la verda rubando. Sed tiu - intertempe jam tute eksmoda - kutimo ne plu ekhavis efikon ĉe novaj membroj. Mi supozas ke ĝi definitive malaperis post la forpaso de Maurice Jaumotte en 1970. Mi mem ie iam cedis mian medalon, eble lasis ĝin en skatolo kun arĥivaĵoj, kiuj iris al Fondaĵo Van Biervliet en Kortrijk. Ĉar la plimulto de tiu fondaĵo revenis al Antwerpen, la nura ebleco por trovi ekzempleron verŝajne estas en erfgoedbibliotheek. Do eble vi informiĝu ĉe Cyreen Knockaert.

En la daŭro de la jaroj, pluraj familioj de forpasintaj membroj donacis librojn kaj memoraĵojn al la Esperanto-centro. Sed mi ne rememoras ke mi iam revidis tian medalon.

Amikajn salutojn,

Ivo Durwael



03.05.2022 18:25

Saluton, Bert.

Eble tiu medalo interesus vin.

Amike, Maksim.



https://www.darabanth.com/en/searching/?q=Pro+Esperanto&text_src=only_in_description&k=
https://www.delcampe.net/en_GB/collectables/coins-banknotes/unclassified/gyeney-judit-1942-dn-pro-esperanto-magyar-eszperanto-szoevetseg-oentoett-br-emlekerem-100mm-t-2-1499578603.html

04.05.2022 18:31

Saluton Maksim,
Fakte, ĝi estas belega kaj interesa medalo, priskribinda kaj montrinda!
Multan dankon, kara samideano!
Amike kaj numismate,
Bert



.... (vidu retroŝto Jk 9,n-ro 2 por la komenco de ĉi korespondado)

09.05.2022 12:01

Kara Luis,
Jen la 2-a kaj 3-a kontribuajoj por ESF-Connected pri esperanta numismatiko. Ambaŭ estis provlegitaj de la sama kompetenta esperantisto, sed tamen tio neniam estas garantio, ke ne eskapis iu erar(et)o. Do, ne hezitu mem lastfoje kontroli ĉion.
Mi sincere esperas, ke la temo kaj la prezentado plaĉos al via legantaro.
Evidente ni estas pretaj provi respondi al ĉiuj eblaj demandoj pri la temo.
Amike kaj numismate,
Bert Boon

09.05.2022 18:39

Saluton, kara
Koran koran dankon pro viaj tre altkvalitaj kontribuoj, certe mi kaj la tuta legantaro tre interesiĝas pri viaj artikoloj.
Fakte, mi konfesas ke mi sciis nenion pri numismatiko, kaj nun trovas ĝin tre interesa, mi certas ke ankaŭ multaj legantoj spertis same.
Viaj artikoloj aperos denove en Esperanto, la angla kaj la hispana, tiel ni kovras multe pli da legantoj, kaj ne okazas tre ofte ke legantoj rekte demandas, sed se tio okazas certe ni kontaktos vin prie.
Denove mi elkore dankas kaj esperas ke ni rekunlaboros baldaŭ.
Kunlaboreme,
Luis



14.05.2022 19:28

Saluton, Bert!
Eble Garry jam informis vin - sed kaze ke ne, mi nur volis diri, ke ni kredas ke ni ne havos sufiĉe da potencialaj aĉetantoj por la monero... do la LKK pensas ke eble plej prudenta solvo estos ne entrepreni tion, ĉar alikaze ni riskas grandan perdon....
Amike,
Ĵenja

14.05.2022 21:42

Saluton Ĵenja!
Ĝis nun Garry ne kontaktis min. Evidente, mi esperis pozitivan mesaĝon, sed mi komprenas la vidpunkton de la LKK, ĉar kostoj sendube kreskis pro la pandemio kaj la prokrasto de la UK. Tamen, strategio de antaŭmendo pli akurate estus doninta iom pli da certeco pri la okazo sukcese vendi la medalon..
Nu, estas belega la skizo kaj tiel ankaŭ valora memoraĵo kaj mi deziras, ke la UK estos tre sukcesa, ankaŭ finance, ĉar tion meritas ĉiuj kunlaborantoj.
Amike kaj numismate,
Bert



25.05.2022 11:42

Saluton Bert,

Kun multe da malfruo mi legis vian revuon. Kaj aperas en ĝi interesaj kontribuoj kiuj ankaŭ povus interesi ne-numismatikemulojn;-) kaj eble meritas iel lokon en Horizon-taal. Ĉu ebla aldoni min, kiel ĉefredaktoro de Horizon-taal, al via distribulisto aŭ ĉu tio signifas ke mi iĝu membro?

Anticipan dankon.

Piet

25.05.2022 13:57

Saluton Piet,

Dankon pro via mesaĝo.

Mi preferas pozitive reagi al via peto, ĉar estas agrable ricevi bonan komenton pri la ENA-revuo.

Mi kompreneble povas aldoni vian nomon kiel 154an individuan membron aŭ LA VERDA STELO aŭ alian de vi preferatan asocion kiel 26an asocian membron. Membriĝi kaj regule ricevi la revuon (nur digitale) estas ambaŭ tute senkoste. Esti membro donas la rajton ricevi ĉiun novan numeron (kvarfoje jare) kaj la eblecon retrovi, eventuale eĉ elŝuti la malnovajn numerojn. Do poste por Horizontaal vi povus uzi ĉion kion vi deziras, post simpla peto.

Post la mencio "mi volas aliĝi" vi aŭ via asocio estos ENA-membro.

Amike kaj numismate,

Bert



30.05.2022 2:00

Saluton kara Bert Boon

Edukado.net kaj Kajto kore salutas vin okaze de via naskiĝtaga datreveno.

Ni deziras al vi bonan sanon, feliĉon kaj multajn fruktodonajn kaj ĝojgajn renkontiĝojn kun aliaj membroj de nia komunumo.

Komence de ĉiu nova jaro aŭ vivperiodo oni taksas la pasintecon kaj vortumas novajn dezirojn kaj planojn. Kiuj estas viaj planoj por la estonteco rilate nian komunan lingvon Esperanto? Bv. sciigi tion al ni sube ĉe la komentoj.

Antaŭdankon kaj bonan festadon, kore, Katalin Kovats, redaktoro

Kaj nun vidu nian surprizon en la filmejo: <https://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=352>

01.06.2022 22:16

Kara Katalin,

Unuavice koran dankon pro viaj bondeziroj okaze de mia datreveno.

Pri miaj planoj:

aktuale mi preparas la trian numeron de la 9a jarkolekto de "Esperanta Numismatiko" .Por la venonta jaro mi baldaŭ ekkompilos la "Unua Katalogo de la Esperanta Numismatiko" kaj la "Unua Terminaro de la Esperanta Numismatiko", surbaze de la 40 numeroj de la unuaj dek jarkolektoj.

Eble vi ne jam konas la ENA-revuon. Mi do aldone kaj donace sendas al vi la pli aktualan numeron.

Korajn salutojn al vi kaj al Kajto.

Amike kaj numismate,

Bert Boon (Iniciatoro kaj finredaktoro)

ANONCOJ

&

EVENTOJ



Anakronisma sed tamen aktuala anonco de la Esperanto-Klubo de Birmingham. Sendube prava averto!

Tamen ne nur fejsbuko estas heroldo de malveraĵoj. Tio ankaŭ koncernas multajn (eble preskaŭ ĉiujn) tiel nomatajn “sociaj komunikiloj”. Eĉ Google kaj aliaj diĝitaj “enciklopedioj”, tro ofte nutrataj de nefakuloj, ne vere meritas la fidon de verkistoj kiuj serĉas fidindajn fontojn koncerne iun ajn temon.

Tamen, ankaŭ la historigrafio de Esperanto abundas je “Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado”, kiel tekstas la subtitolo de la nemalhavebla libro “**Esperanto sen mitoj**” far nia germane samideano Ziko Marcus Sikosek kaj eldonita de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) Antverpeno, 1999, 311 p.

Citinde estas nepre unu el la opinioj de esperantaj legintoj. James Rezende Piton el Brazilio, eksa TEJO-estrarano pri informado reagis tiel: “*Gratulon, estas tre bone koncize enmeti ĉion tiklan por nia informado, science argumentitan kaj listigitan. Mi jam tiomfoje renkontis “propagandantojn”, kiuj daŭre insistas pri centjaraj bazaj eraroj, kiuj misinformas interesitojn, kaj tiuj lastaj tuj poste elreviĝas.*”

Jen la titoloj de entute sep ege legindaj kaj legendaj ĉapitroj:

1. Informado sen mitoj
2. Komunumo sen mitoj
3. Subtenantoj sen mitoj
4. Lingvo sen mitoj
5. Planlingvoj sen mitoj
6. Zamenhof sen mitoj
7. Manifestoj sen mitoj

Mi ege rekomendas la legadon de tiu tre grava verko, vere deviga por ĉiu vera esperantisto, kiu prave atakas la stultaĵojn diskonigatajn de trokredemuloj koncerne preskaŭ ĉiujn aspektojn de la esperanto kulturo.

Fine, mi donas la parolon al la aŭtoro, kiu en sia manifesto citas Immanuel Kant: “*Klerismo estas la eliro de la homo el sia memkulpita nememstareco. Nememstareco estas la nekapablo uzi sian propran racion sen la gvido de aliuloj. Memkulpita ĝi estas, se ĝin kaŭzis ne manko de intelekto, sed manko de kuraĝo uzi sian racion memstare. Sapere aude – havu la kuraĝon uzi la propran racion sen la gvido de aliuloj, jen la devizo de la klerismo.*”

Bert

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma cello estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ok jaroj ĝis 154 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skyne.be